

Espero Katolika



Numero 1-3/2016

Januaro-Marto 2016



Sur la kovrilo: *La Papo celebras Meson por la indiĝenaj komunumoj de Chiapas, en San Cristóbal de Las Casas: ĝi estis unu el la eventoj dum lia vojaĝo al Meksikio (v. p. 6).*

ENHAVO

FRANCISKO KAJ KIRILL RENKONTIĜIS EN KUBO

«Finfine; ni estas fratoj»	3
Kroniko de la renkonto kaj resumo de la komuna deklaro	4

EN MEKSIKIO, PILGRIMANTO DE MIZERIKORDO KAJ PACO

La 12-a eksteritalia vojaĝo de Papo Francisko	6
«Mi diros, ke mi songas en Esperanto»	8

LA PRAAVINOJ DE JESUO	9
-----------------------	---

RADIO VATIKANA 85-JARAĜA	11
--------------------------	----

LA PILGRIMLOKO EN LA SALETTE	12
------------------------------	----

NITRA, LA URBO DE “NIA 69-a” (unua parto)	14
---	----

FUNEBRE	15
---------	----

MOVADE	16
--------	----

Radio Vatikana, 11

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>

UEA-konto “ikue-v” * Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio

IBAN IT34H076010320000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminielli - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

La unuaj vortoj eldiritaj de Papo Francisko la 12-an de Februaro en la flughaveno José Martí de Havano, Kubo, ĉirkaŭbrakante la Patriarkon de ĉiuj Rusioj, Kirill:

«FINFINE; NI ESTAS FRATOJ»

Ĝi estis la unua historia renkonto inter Papo kaj Patriarko de Moskvo kaj de ĉiuj Rusioj depost la skismo de la jaro 1054.



«Mi sentis min fronte al frato, kaj ankaŭ li diris la samon al mi. Du episkopoj, kiuj parolas pri la situacio de siaj Eklezioj, kaj due, pri la situacio de la mondo, pri la militoj, pri ortodokseco, pri la venonta tutortodoksa Sinodo... Mi diras al vi, vere, mi sentis internan ĝojon, kiu estis de la Sinjoro». Dum la aviadila flugo el Havano al Urbo Meksiko, por komenci la apostolan vojaĝon al Meksikio, tiel Francisko parolis pri la ĵus okazinta renkonto kaj ĉirkaŭbrako kun Patriarko Kirill.

«Frato. Ni estas fratoj. Estas tre klare, ke ĉi tio estas la volo de Dio». La vortoj de la Papo al Patriarko Kirill estis sigelitaj de ĉirkaŭbrako antaŭ la fermo de la pordo, malantaŭ kiu okazis la komenco de la historia renkonto. Kelkajn horojn antaŭ la rendevuo Francisko konfidis per tūitera mesaĝo siajn esperojn, parolante pri “tago de graco” kaj difinante “donaco de Dio” la renkonton kun la Patriarko.

«Frato, frato, ni estas fratoj; finfine!», diris Francisko. «Kvankam niaj malfacilaĵoj ankoraŭ ne glatiĝis, tamen estas la ebleco renkontiĝi, kaj tio estas bele. Nun la aferoj estas pli facilaj» – estis la saluto de Kirill al

la Papo. «Estas pli klare, ke ĝi estas la volo de Dio» – respondis la Papo.

La duhoran privatan interparolon antaŭ la subskribo de la komuna deklario, Francisko kaj Kirill resumis post ĝi fronte al la reprezentantoj de siaj Eklezioj kaj la ĵurnalistoj per improvizitaj vortoj, redeklarante la grandan fratecon ekzistantan inter la du Eklezioj. «Ni parolis kiel fratoj – diris la Papo – ni havas la saman Bapton, ni estas Episkopoj, ni parolis

pri niaj Eklezioj, ni konstatis, ke ni akordiĝas pri la fakto, ke la unuecon oni konstruas per la irado; ni parolis klare, sen duonvortoj». «Mi konfesas al vi» – daŭrigis la Papo – «ke mi spertis konsolon en la spirito de ĉi tiu dialogo». La Papo sekve dankis Kirill'n pro la «frata humileco kaj pro la forta deziro de unueco», substrekante, ke dum la interparolo oni aludis serion da iniciatoj laŭ li fareblaj kaj realigeblaj. Kaj li poste tre dankis la kuban popolon kaj ĝian prezidenton Raul Castro, kiu ĉeestis, pro la memdispono: «Se oni daŭrigas tiel» – li aldonis – «Kubo estos la ĉefurbo de la unueco».

Unuecon inter la du Eklezioj elvokis ankaŭ Kirill, kiu parolis pri «frata diskuto kun plena komprenemo kaj respondeco por la du Eklezioj kaj por la estonteco de kristanismo». «Diskuto riĉa je enhavo» – li klarigis – «kiu ebligis kompreni kaj senti la reciprokajn starpunktojn». «La du Eklezioj» – konkludis Kirill – «povos labori kune, por ke ne plu estu milito, por ke ĉie la homa vivo estu respektata, por ke plifortiĝu la fundamentoj de la moralo de la familio kaj de la persono».

Carlo Sarandrea

RENKONTO KAJ KOMUNA DEKLARO DE PATRIARKO KIRILL KAJ DE PAPO FRANCISKO

La 12-an de Februaro okazis vere historia renkonto en Havano, Kubo. Patriarko Kirill de Moskvo kaj de ĉiuj Rusioj tiam faris paŝtistan

la plej granda el ĉiuj ortodoksaj Eklezioj.

La strukturo de la ortodoksa Eklezio estas malsama ol tiu de la katolika, en kiu la Papo povas gvidi la tutmondan Eklezion. La ortodoksa Eklezio estas federacio de sendependaj Eklezioj, kiuj agnoskas unu la alian. La plej grandajn kaj antikvajn paŝtiste gvidas patriarkoj, sed neniu patriarko povas estri alian Eklezion aŭ patriarkon.

La ekumena Patriarko de Konstantinopolo havas la unuan rolon inter la samrangaj estroj de la Eklezioj. Iusence la nuna Patriarko Bartolomeo de Konstantinopolo estas la estro de la ortodoksa Eklezio, sed li havas malpli da



viziton al Kubo; Papo Francisko haltis en tiu karibia insulo survoje al Meksikio kaj ili renkontiĝis. Dum la lastaj jardekoj okazis pluraj renkontoj inter la Papo kaj diversaj estroj de la ortodoksa Eklezio. Papo Paŭlo la 6-a renkontis en Jerusalemo Patriarkon Athenagoras, la ekumenan patriarkon de Konstantinopolo: ĝi estis la unua renkonto de Papo de Romo kun ĉefpatriarko de la ortodoksa Eklezio post multaj jarcentoj. Tamen tiu en Kubo estis la unua inter la Papo kaj la estro de la rus-ortodoksa Eklezio,

influo ol la Papo en la katolika Eklezio.

La rus-ortodoksa Eklezio ne separis sin mem de la katolika Eklezio. La interkomunio kun la katolika Eklezio ĉesis pro la disiĝo de la ortodoksa komunio el la katolika. Tiu divido okazis dum longa periodo, ne en unu momento.

La rus-ortodoksa Eklezio havas historion de longa interrilato kun la Patriarkejo de Konstantinopolo. Dum pluraj jarcentoj, la episkopoj de Rusio estis grekoj kaj pro tio en la nuntempa bizanca liturgio oni ankoraŭ kantas por la



episkopo en la greka, ankaŭ en la ne-grekparolantaj landoj.

Kvankam la rusa Eklezio mem ne rompis la komunecon kun la katolika Eklezio, ĝi plurfoje konfliktis kontraŭ la katolikaj landoj kaj aŭtoritatoj, ekzemple kontraŭ Pollando, Litovio kaj la ordeno de la germanaj Kavaliroj. La rus-ortodoksa Eklezio tre rifuzis la Koncilion de Florenco-Ferrara (1431-1445), kiu klopodis unuigi la Ekleziojn. Kiam la ekumena movado komenciĝis dum la 19-a kaj aparte dum la 20-a jarcento, la rus-ortodoksa Eklezio fariĝis ano de la monda Konsilio de la Eklezioj, sed ĝi, en tiu kaj en aliaj ekumenaj organizaĵoj, aktivis malplimulte ol la aliaj Eklezioj. Papo Johano Paŭlo la 2-a tre deziris viziti Rusion, sed la rus-ortodoksa Eklezio forte kontraŭstaris tian viziton kaj pro tio ĝi ne okazis.

Dum la lastaj jardekoj ekzistas kontaktoj kaj rilatoj inter la katolika kaj la rus-ortodoksa Eklezioj. Tamen foje la rilatoj ne estis tre fervoraj. Do, la anonco de la renkonto inter la Patriarko kaj la Papo surprizis multajn observantojn. Interese, la renkonto okazis nek en Romo nek en Moskvo, sed en Havano. En la komuna deklaro, ili parolis pri la avantaĝo veni kaj paroli “malproksime de la malnovaj disputoj de la ‘Malnova Mondo’.” Ili ĝojis pri la renkonto malgraŭ la “konfliktoj de malproksima aŭ proksima pasinteco, de malkonsentoj ricevitaj herede de niaj prauloj”. Oni klopodas restarigi la unuecon inter la Eklezioj. Estas ja notinde, ke la deklaro parolas pri la deziro havi kaj esprimi komunan kristanan fidon. Tute mankas kondamno de la alia Eklezio, kio estis ofta elemento de la oficialaj deklaroj en la pasintaj epokoj. Ili rekonas, ke la komunaj taskoj de la nuntempaj kristanoj estas multe pli grandaj ol la doktrinoj, kiuj ankoraŭ disigas ilin.

Oni povas aparte noti kelkajn temojn pritraktitajn en la deklaro.

1) Pri la kristanoj de Meza Oriento. “Ni petas de la internacia komunumo, ke ĝi urĝe agu por preventi la pluan forpelson de la kristanoj el Meza Oriento”.

2) Pri la unueco en la suferado de la martiroj. “Ni kliniĝas antaŭ la martirigo de tiuj, kiuj koste de propra vivo, atestas la veron de la Evangelio, preferante la morton ol la apostatecon je Kristo. Ni kredas, ke ĉi tiuj martiroj de nia tempo, apartenantaj al diversaj Eklezioj, sed



Interparolo de Papo Francisko kun la prezidento de Kubo Raul Castro

kunigitaj de komuna suferado, estas garantiaĵo de la unueco de la kristanoj”.

3) Pri Eŭropo kaj kristanismo. “Kvankam ni restas malfermitaj al kontribuo de aliaj religioj al nia civilizo, ni estas konvinkitaj, ke Eŭropo devas resti fidela al siaj kristanaj radikoj. Ni petas de la kristanoj de orienta kaj de okcidenta Eŭropo kuniĝi, por kune atesti Kriston kaj la Evangelion, tiel, ke Eŭropo konservu sian animon formitan de dumil jaroj da kristana tradicio”.

4) Pri la familio. “Ni estas zorgoplenaj pro la krizo de familio en multaj landoj. Ortodoksuloj kaj katolikoj kundividis la saman koncepton pri familio kaj estas vokataj atesti, ke ĝi estas vojo de sankteco, kiu atestas la fidelecon de la geedzoj en siaj reciprokaj rilatoj, ilian malfermitecon al generado kaj edukado de la infanoj, la solidarecon inter la generacioj kaj la respekton al la pli malfortaj. La familio baziĝas sur geedziĝo, ago libera kaj fidela de amo de viro kaj virino”.

5) Pri la interrilatoj de katolikaj kaj ortodoksaj kristanoj. “Ni ne estas konkurencaj, sed frattoj, kaj ĉi tiu koncepto devas gvidi ĉiujn niajn agojn, reciprokajn kaj al la ekstera mondo. Ni invitas la katolikojn kaj la ortodoksulojn de ĉiuj landoj lerni vivi kune en la paco kaj en la amo, kaj havi «unu kun la alia la samajn sentojn» (Rom 15, 5)”.

P. Stefano Hawkes-Teeple, SJ

La 12-a eksteritalia vojaĝo de Papo Francisko EN MEKSIKIO, PILGRIMANTO DE MIZERIKORDO KAJ PACO

Post la etapo en Kubo (pri kiu ni raportas en alia artikolo) sabaton la 13-an de Februaro, kiam en Eŭropo jam estis dimanĉo, Francisko atingis Meksikion por 5 intensaj tagoj de apostola vojaĝo. La unuaj eventoj estis la oficialaj renkontoj kun la ŝtataj aŭtoritatoj kaj diplomataro kaj kun la landaj episkopoj.

Sekvis la Meso en la Baziliko de Guadalupe en Urbo Meksiko; ĝi estis la ĉefa motivo, pro kiu Francisko atingis Meksikion – omaĝi al la ikono de la Dipatrino de Guadalupe, fronte al kiu li restis preĝanta dum pluraj minutoj, kaj tiel firmigi la landon en la kredo. La pilgrimloko staras tie, kie en 1531 la indiĝeno Juan Diego, kiu konvertiĝis al kristanismo, havis 5 aperojn de la Dipatrino. Surbaze de lia ekzemplo, kiu fariĝis heroldo de Maria, Francisko memorigis, ke ĉiuj estas necesaj, ĉefe tiuj, kiuj normale ne gravas, ĉar oni taksas ilin ne adekvataj.

Dimanĉon la 14-an la Papo atingis la urbon Ecatepec; preskaŭ 300.000 fideluloj akceptis lin, kun entuziasmo, kiu iris trans ĉiu prognozo. Al ĉiuj Francisko parolis pri “la tri tentoj, kiuj klopodas maldignigi nin”: vantemo, alligiteco al riĉaĵoj, orgojlo. Poste, dum la Anĝelusoj, li memorigis, ke tiu lando ne plu devas priplori “virojn kaj virinojn, junulojn kaj infanojn, kiuj estas detruataj en la manoj de la komercistoj de morto”.

Sekvis kortuŝa renkonto, tiu kun la junegaj pacientoj, iliaj familioj kaj la personaro de la pediatria hospitalo Federico Gómez de Urbo Meksiko, valorriĉa strukturo, kiu ĉiujare flegas multajn infanojn malsanajn je tumoro aŭ kun kripliĝoj. La batoj de sonorilo, ludata de du infanoj, kiuj resaniĝis el kancero, ĝuste por sigelias venkon kontraŭ la malsano kaj la kanto de “Saluton Maria” farita de juna malsanulino, estis kelkaj el la sonoj, kiuj markis la renkonton de Papo Francisko kun 36 infanoj kaj la viziton en la onkologia fako. Senti sin flegataj, esti amataj kaj akompanataj – ili estas la pli gravaj kuraciloj indikitaj de la Papo dum lia parolado. Tre gravas – li aldonis – ankaŭ neanstataŭigebla kuracado, kiun li difinis “amemo-terapijo”.

La 15-a de Februaro estis la tago de la vizito al San Cristóbal de Las Casas, en ŝtato Chiapas. Por la indiĝenaj loĝantaroj la Papo celebris Meson kaj ankaŭ tie tre varma estis la akcepto rezervita al la Papo. Pli ol 100.000 estis la ĉeestantaj fideluloj en la urba sporta centro. Ili plurfoje salutis Franciskon kiel la “Papon de la malriĉuloj, de la justeco kaj de la paco”. Kaj Francisko petis pardonon en nome de ĉiuj, kiuj prirabis kaj ekskludis la indiĝenajn popolojn de tiu tero, plena je riĉofontoj, sed kiu restas unu el la plej malriĉaj de Meksiko. Allogaj estis la koloroj, la kantoj kaj la muzikoj, per kiuj tiuj praloĝantidoj plibeligis la



Papo Francisko preĝanta antaŭ la bildo de la Virgulino Maria en la Baziliko de Guadalupe

eŭkristian liturgion. La Papo do sin turnis rekte al la ĉeestantaj indiĝenoj kaj agnoskis plenan dignon al tiuj popoloj, nekomprenataj kaj ekskluditaj de la socio. “Kelkaj” – li diris – “taksis malsuperaj iliajn valorojn, ilian kulturon kaj iliajn tradiciojn. Kelkaj – allogataj de la povo, de la mono kaj de la leĝoj de la merkato – senigis ilin de iliaj teroj aŭ realigis aferojn, kiuj polucii ilin. Kiom da malfeliĉo! Kiom da bono farus al ni konscienc-ekzameno kaj lerni diri: ‘pardonu, pardonu, gefratoj’. La hodiaŭa mondo, prirabata



de la kulturo de la forpartigo, bezonas vin”. Trifoje Francisko diris: frateco, solidareco, paco. La bibliajn legaĵojn dum la Meso oni eldiris en la indiĝenaj lingvoj kaj porokaze la Papo liveris dekretan, kiu rajtigas la uzon de tiuj lingvoj en la liturgio.

Posttagmeze, post la renkonto kun la praloĝantidoj, almenaŭ 50.000 fideluloj akceptis la Papon en la stadiono de Tuxtla Gutiérrez, en Chiapas, kie okazis la renkonto kun la familio. Francisko redeklaris la aktualecon kaj belecon de la familio, en kiu oni venkas izoligon kaj en kiu oni donas kuraĝon unuj al la aliaj, por ĉiam denove rekomenci. La soleco estas la tino, kiu sekigas la animon, diris la Papo. Leĝoj, kiuj protektu la familion, kaj persona sindevigo estas bona duo, por rompi la spiralon de malstabileco.

La postan tagon, la 16-an de Februaro, granda ĝojo estiĝis por Papo Francisko meze de 20.000 fideluloj en stadiono “Carranza”, en Morelia, ŝtato Miĉoacán, en la geografia centro de Meksikio. La okazo estis la Meso kun la pastroj, gereligiuloj kaj seminarianoj. Francisko instigis venki la rezignacion, kiu “enfermas nin en la sakristioj” kaj la rezignacion, kiu “malebligas al ni ŝanĝi sistemon regatan de komercado de toksaj drogoj, koruptado kaj perforto”. La Papo memorigis la ekzemplon de Tata Vasco, la unua episkopo de tiu regiono kaj defendanto de

la indiĝenaj loĝantaroj. Li estis hispano, kiu en la 16-a jarcento fariĝis indiĝeno kaj ne rezignaciis fronte al la socia ekskludado de sia popolo. Morelia ne estas facila tero; tie komercado de toksaj drogoj estas malmola realaĵo, kun milito inter la diversaj bandoj, sed ĝi estas ankaŭ tero, kiu igis la defendon de sia arta havaĵo, flago.

La tago finiĝis per la renkonto kun la junularo en la stadiono de Morelia. “Esti junaj en Meksikio” – diris Francisko – “estas la plej granda riĉaĵo kaj oni ne povas foroferi ĝin”. Plie, la Papo, kiu lasis sin esti kuntrenita kaj kortuŝita de la grandega amemo de la pli ol 100.000 ĉeestantaj gejunuloj. Al ili li postlasis unu vorton, “la bazon de ĉio: Jesuo Kristo. Li forigas ĉiujn klopodojn igi vin senutilaj, aŭ puraj pagitaj rolantoj por alies ambicioj”.

La lasta tago en Meksikio disvolviĝis en Ciudad Juarez, norde de la lando. Unu el la plej perfortaj urboj de la mondo, kie la komercado de homaj estuloj ligiĝas kun la komercado de toksaj drogoj, kie la migrantoj, ne multajn kilometrojn distance el la landlimo, klopodas eniri Usonon kaj pro tio ili foje perdas sian vivon. Al ĉiuj ĉi aspektoj de tiu tero la Papo aludis dum la tri lastaj renkontiĝoj de la vojaĝo – kun la enkarcerigitoj, kun la entreprenistoj kaj laborantoj kaj fine dum la Meso je la ĉeesto de la migrantoj.

Francisko iris tien por paroli ankaŭ kaj ĉefe al tiuj, kiuj bedaŭrinde estas la frukto de la civilizo de la forpartigo: la enkarcerigitoj. Tial, tuj post alveno al Ciudad Juarez, la Papo iris al la reeduka centro Cereso la 3-a, unu el la pli grandaj en la lando. Tie estas 3.000 malliberuloj; en la korto ariĝis 700 el ili kaj pere de televido pliaj 254.000 malliberuloj de 389 meksikiaj malliberejoj povis spekti la eventon. “Ni perdis jardekojn” – diris Francisko komence de sia parolado – “opiniante, ke la problemon de la sekureco oni solvas nur enkarcerigante, dum necesas preventi kaj alfronti la strukturajn kaŭzojn de nesekureco”. Al ĉiuj li ankaŭ memorigis, ke necesas rompi la erarajn rondojn de perforto kaj krimeco, ke ne ekzistas loko neatingebla de la mizerikordo. Do, ĉiuj havas la eblecon pente liberiĝi. “Ni ankaŭ forgesis” – li daŭrigis – “tre atenti la vivon de la personoj, de iliaj familioj, de la suferantoj pro la erara rondo de la perforto”.

La karceroj estas ofte la nigra truo de nia socio: la dia mizerikordo memorigas al ni, ke la karceroj estas simptomo pri la farto de la socio;

ofte ili ankaŭ estas simptomo de la silentoj kaj mankoj estigitaj de la kulturo de la forpartigo, de socio, kiu ĉesis investi en la vivo; de socio,



kiu forlasis siajn gefilojn.

Plie la mizerikordo memorigas al ni, ke la reeniro en la socion ne komenciĝas en la karcero, sed ĝi komenciĝas antaŭe, ekstere, en la stratoj de la urbo. Necesas do socio, kiu ne malsaniĝu, ĉar la problemon de la sekureco oni solvas intervenante por alfronti ĝiajn motivojn. Kaj la socia reenigo komenciĝas sendante la gefilojn al la lernejo, kreante publikajn spacojn por la libera tempo, akcelante la civitanan partoprenon.

Sekvis, post la vizito al la malliberejo, la renkonto, ankoraŭ en Ciudad Juarez, kun pli ol 3.000 reprezentantoj de la mondo de la laboro. Francisko reeldiris al ili siajn admonojn kontraŭ la riskoj por la junularo: “La manko de la ebleco havi elteneblan laboron,” li diris “estas unu el la pli grandaj plagoj, al kiuj estas almetitaj la junaj meksikianoj, ĉar la plago de malriĉeco, estigita de senlaboreco, povas fariĝi fruktodona grundo por la merkato de toksaj drogoj”.

La defio indikita de la Papo estas la investado en la personoj, superante la regantan paradigmon pri la ekonomia utilo. Ĝi estas la plej bona investo, ĉar la reganta pensomaniero, kiu postmetas la personojn post la financoj ofte kondukas al ekspluatado de la dungitoj kiel objektoj por uzi kaj poste forĵeti. La kapitalo tiel kondiĉas la vivon de la personoj kaj misformas la socion: “Dio postulos konton de la sklavistoj de niaj tagoj kaj ni devas fari ĉion eblan, por ke tiuj situacioj ne plu okazu.”

“Oni ne povas lasi la estontecon en la manoj de la koruptado, de brutaleco, de manko de egaleco. Multfoje” – klarigis la Papo al entreprenistoj kaj laboristoj – “ne facilas trovi akordon en mondo pli kaj pli konkurencokapabla, nek facilas konduki ĉiujn partiojn al intertraktoj. Sed la manko

de intertraktoj estas zorgiga panoramo, ĉar oni lasas al la gajno kaj al la profito la eblecon decidi pri la destino de la popoloj”. “La enspezoj kaj la kapitalo ne estas havaĵoj superaj al la homoj, sed je la servo al la komuna bono”.

“Neniam plu morto kaj ekspluatado”, tion diris la Papo dum la posta Meso celebrata je nur 80 metroj el la landlimo kun Usono, kie migrantoj klopodas trapasi la landlimon por eniri Usonon en El Paso. Antaŭe la papa aŭtomobilo veturis laŭlonge de la landlimo, markita de metala reto. Francisko iomete haltis por saluti la fidelulojn. La signifo de lia gesto kuŝis en tio, ke estas tre intensaj la migrantaj fluoj el Meksikio al Usono, en kiu la loĝantoj el meksikia deveno estas pli ol 30 milionoj kaj konataj estas la problemoj de la meksikiaj migrantoj. Kaj multaj el ili estis tie, malantaŭ la reto.

Francisko iris al la granda kruco starigita sur la landlimo kaj preĝis silente; tie estas ankaŭ la ŝuoj de la migrantoj por simboli la multajn, kiuj mortis dum ili klopodis trapasi la landlimon. Vidante la kontraŭ-migrantajn retojn, kiuj dividas la du ŝtatojn, celatingo por la espero de miloj da viroj kaj virinoj, kaj fronte al centoj da miloj da personoj Francisko parolis pri la humanecaj krizoj, kiuj devigas forlasi la patrujon; li parolis pri la komercado de homaj estuloj kaj pri la manko de leĝeco, kiu igas la junulojn “karno por kanonoj”. Poste li substrekis la certecon de la ŝanĝiĝo: “La nokto povas aspekti tre malluma” – li diris – “sed en Meksikio estas multaj lumoj, kiuj anoncas la esperon”.

Kiam la aviadilo rekondukis lin al Romo, Francisko publikigis ĉi tiun tŭiteran mesaĝon: “Dankon al Meksikio kaj al ĉiuj meksikianoj. Ke la Sinjoro kaj la Virgulino de Guadalupe ĉiam akompanu nin”. La mesaĝo koincidis kun la atingo de 27 milionoj da sekvantoj de la papa konto Pontifex.

«MI DIROS, KE MI SONGĀS EN ESPERANTO»



LA PRAAVINOJ DE JESUO

Kiam Li eniris en la historion de la savo kun homa aspekto, interalie per naskiĝo el nekredible malalta rango, Jesuo elektis prapatraron en kiu estas, samkiel por ĉiu homa estulo, avinoj, praavinoj, pra-praavinoj.

La malforta Infano, kiu naskiĝis en la groto de Betlehemo, havas malantaŭ Si longan genealogion kaj ĝin listigas Mateo en la unua ĉapitro de sia Evangelio, ĉapitro, kiun oni emus “salti” ĉar, ekskludante kelkajn majestajn nomojn, ĝi konsistas el listo de personoj nekonataj de ni. Kaj ili ne ĉiam brilegas pro virtoj.

Sinjoro, kiujn praavinojn Vi elektis?

Vi volis alpreni en via karno, en via D.N.A. ni diras hodiaŭ, la tutan homan malfortecon por elaĉeti ĝin. Ne nur Vi “non horruisti Virginis uterum” (ne malestimis la virgulinan uteron), kiel ni kantas en la Tedeumo. Ne, tio ne sufiĉis al Vi. En Via genealogio, Sinjoro, estas prapatraro, kiu ne estas tute modela. En ĝi aperas sanktuloj, sed ankaŭ pekuloj; aperas izraelidoj, sed ankaŭ fremduloj, por indiki, kiom Vi radikigiĝas en la tuta homaro. Ĝi estas sinsekvo de generacioj, en kiu viciĝas viroj kaj virinoj: kelkaj el ili lumantaj ekzemploj de virtoj, aliaj iom malhelaj.

Viroj kaj virinoj: jes, estas ankaŭ la virinoj, kvankam dum la foraj bibliaj epokoj la virinoj ne multe gravis en la malvasta horizonto al ili rezervita, tamen ili estis nemalhavebla ekzistado por generi kaj daŭrigi la idaron.

Oni ne ĉiam traktis bone la virinojn en la antikvaj epokoj. Tion diras al ni Sirahido; tion rediras Kohelet. Ili estis la sociaj aranĝoj de tiu epoko, el ĉefe masklisma speco. La pia izraelido tion sciis kaj ni supozas, ke li ne multe emis akcepti kaj aprobi la unuan ĉapitron de la evangelio laŭ Mateo, en kiu la virino estas rolulino de la sav-historio, ne kontraŭ, ne egala al la viro,

sed kompletiga por li.

En via genealogio, Sinjoro, estas eminentaj personoj kaj pri-diskutindaj personoj. Al ni ne plaĉus havi pravinon “problemodonan”, sed Vi, Sinjoro, enigis kelkajn el

tiaj en vian mirindan savodonan projekton. En ĉi tiu projekto, laŭ nia (mallarĝa) vidpunkto la pravinon de Jesuo devus esti ĉiuj modelo, kiel tiu priskribita en la libro de la Proverboj (31, 10-31).

Sara, la elstara patrino, certe estis tia. Tia ni imagas ŝin. Sed ŝi havis etan malvirton: ŝi “stamfis”, ŝi ne havis paciencon, ŝi ne kapablis atendi la realigon de la planoj de la Plejaltulo; ŝi gravedigis la sklavinon; ŝi mezuris la tempon per sia metro, ne per tiu de Dio. Vi estas la Dio de mizerikordo kaj de la senfina pacienco; Sara ne havis paciencon, ŝi ekkolerigis.



Sara, la elstara patrino



Tamar (pentraĵo de Rembrandt)

Papo Francisko, al insida demando de franca ĵurnalistino dum flugreveno el Meksikio (“Ĉu vi sonĝas en la hispana aŭ en la itala?”) respondis: «Mi diros, ke mi sonĝas en Esperanto», estigante la amuziĝon interalie de pastro Federico Lombardi (dekstre en la fotografio), ĝenerala direktoro de Radio Vatikana. Certe, temas pri spritaĵo, por lerte elturniĝi el la demando, kiu riskis “klasifiki” la Papon kiel “hispanon” aŭ “italon” (ĝi similas al alia demando, kiun oni faradis al Papo Wojtyła: “kiam ludas piedpilke Italio kaj Pollando, de kiu teamo vi estas zeloto?”). Estas pozitive, ke la Papo, kvankam preterpase, menciis Esperanton (pri kiu kompreneble li estas informita, se ne alie pro la fakto, ke Radio Vatikana elsendas en Esperanto jam de 40 jaroj).

La frazon de la Papo oni povas aŭskulti ĉi tie (de minuto 54,32 ĝis 55,01):
<https://www.youtube.com/watch?v=7qaSGRxACZI>

Kaj kion pri tiu Tamar, kiu por naski filon, sin vestis kiel publikulino kaj gravediĝis de sia bopatro? (Gen. 38, 6-30). La mesia idar-linio inkluzivas ankaŭ ŝin, samkiel Raĥab (Jos 2, 1-24), markita kiel la malĉastistino de Jeriĥo, kvankam en la realo ŝajnas, ke ŝi estis gastejestrino. Ŝi estis virino certe sagaca, inteligenta, kies merito estis kaŝi kaj helpi la esplorrigardantojn de Josuo je la momento de la konkero de Jeriĥo. Plejofte nekonata, ŝin rememoras la itala verkisto Luigi Santucci kiel “la eta perlo de la koliero, kiu disvolviĝas direktan al la Elaĉetanto”.

Ni aldonu plian perlon al tiu koliero, nome, tiun dolĉan kreitaĵon, kiu estas Rut, fremdulino, paganino, humila spikumantino; ŝi eniris en la sav-historion eĉ per biblia libro al ŝi titolita, vera juvelo. Kaj tio ĝuste, ĉar edzigante Boaz, Rut eniras la genealogian arbon de Davido kaj sekve de Jesuo. Ŝi fakte fariĝis patrino de Obed, patro de Jiŝaj, siavice patro de la eksterordinara reĝo Davido, laŭdegata, omaĝata kvankam li faris malnoblan aferon; li kaptis sen troaj komplimentoj “tiun, kiu estis la edzino de Urija, la Hetido”. Kaj Mateo tion diras klare (1,6b), li ne allasas kompromisojn. Sed Vi estas la Dio de mizerikordo kaj de la senfina pacienco.

Vi vokas nin mergiĝi en vian mizerikordan amon, markitan de la historiaj epokoj, por ni ne



La spikumantino Rut

ĉiam kompreneblaj. Vi volas montri al ni, ke la savo fluas ankaŭ tra malrektaj riveretoj, ne ĉiam brilegaj.

Pro tio ni ne devas senkuraĝiĝi kaj lasi nin al la ŝiprompo de niaj mizeroj. Ĉar via sankta Eklezio – kiel diras Bruce Marshall, verkisto hodiaŭ iom forgesita – “estas ŝipo, sur kiun rajtas grimpi ĉiu ajn, kiu naĝas en la maro”. Ni sentas nin certe pli sekuraj, konfidante nin al tiu ankro de forta mizerikordo, kiu estas la Virgulino Maria, sed ankaŭ viaj “praavinoj” etendas al ni sian manon por helpi nin surgrimpi.

Giuliana Zavadini Caselli

Proverboj 31, 10-31

Se iu trovis kapablan edzinon, ŝia valoro estas pli granda ol perloj.
 Fidas ŝin la koro de ŝia edzo, kaj have ne mankos.
 Ŝi redonas al li bonon, sed ne malbonon, en la daŭro de ŝia tuta vivo.
 Ŝi serĉas lanon kaj linon, kaj volonte laboras per siaj manoj.
 Ŝi estas kiel ŝipo de komercisto, de malproksime ŝi alportas sian panon.
 Ŝi leviĝas, kiam estas ankoraŭ nokto, kaj ŝi disdonas manĝon al sia domanaro kaj porciojn al siaj servantinoj.
 Ŝi pensas pri kampo, kaj aĉetas ĝin; per la enspezoj de sia mano ŝi plantas vinberĝardenon.
 Ŝi zonas siajn lumbojn per forto, kaj fortikigas siajn brakojn.
 Ŝi komprenas, ke ŝia komercado estas bona; ŝia lumilo ne estingiĝas en la nokto.
 Ŝi etendas sian manon al la ŝpino, kaj ŝiaj fingroj tenas la ŝpinturnilon.
 Ŝi malfermas sian manon al la malriĉulo, kaj etendas siajn manojn al la senhavulo.
 Ŝi ne timas la neĝon por sia domo, ĉar ŝia tuta domanaro estas vestita per ruĝa teksaĵo.
 Ŝi faras al si kovrojn; delikata tolo kaj purpuro estas ŝiaj vestoj.
 Ŝia edzo estas konata ĉe la pordego, kie li sidas kune kun la maljunuloj de la lando.
 Ŝi faras teksaĵon kaj vendas, kaj zonojn ŝi donas al la komercisto.
 Fortika kaj bela estas ŝia vesto, kaj ŝi ridas pri la venonta tago.
 Sian buŝon ŝi malfermas kun saĝo; bonkora instruo estas sur ŝia lango.
 Ŝi kontrolas la iradon de aferoj en sia domo, kaj ŝi ne manĝas panon en senlaboreco.
 Leviĝas ŝiaj filoj kaj ŝin gratulas; ŝia edzo ŝin laŭdegas, dirante:
 Multaj filinoj estas bravaj, sed vi superas ĉiujn.
 Ĉarmeco estas trompa, kaj beleco estas vantaĵo; virino, kiu timas la Eternulon, estos glorata.
 Donu al ŝi laŭ la fruktoj de ŝiaj manoj, kaj ŝiaj faroj ŝin gloros ĉe la pordegoj.

RADIO VATIKANA 85-JARAĜA

La 12-an de Februaro 1931, je la horo 16.49, Papo Pio la 11-a inaŭguris la vaticanan radiostacion, projektitan de Guglielmo Marconi. Do ĉi-jare la “Radio de la Papo” solenas sian 85-jariĝon kaj ĝi daŭrigas, kiel diris Papo Pio la 11-a mem “disvastigi al la 5 kontinentoj la voĉon de la Papo kaj de la Eklezio”, sed per rimedoj kaj servoj tute novaj. Ĝi ĉeestas en la sociaj retejoj per interreta paĝaro 39-lingva kaj hodiaŭ ĝi estas parto de la nova instanco (la “sekretariejo de la komunikado”), kiu estiĝis per la kunmeto de ĉiuj vaticanaj strukturoj, kiuj okupiĝas pri komunikado (Papa Konsilio pri Sociaj Komunikadoj, Gazetara Servo de la Sankta Seĝo, Vatikana Interreta Servo, Radio, Televida Centro, gazeto L’Osservatore Romano, la Presejo, Fotografa Servo, Vatikana Eldona Librejo), dum restos netuŝita la kom-

petenteco de la Ŝtata Sekretariejo koncerne la institucion komunikadon.

En la jubilea jaro pastro Federico Lombardi lasis (1/3/2016) RV’n post 26 jaroj da deĵoro, unue kiel Direktoro de la programoj kaj poste (ekde 2005) kiel ĝenerala Direktoro. Li ĉiam montris simpatian kaj korfavoron al la Esperanto-programo; okaze de la jubilea kongreso de IKUE (Parizo 2010) li sendis varman salutleteron, tradukitan al Esperanto (<http://www.ikue.org/historio/63IKUE001.htm>). Post la fama demando pri la “sonĝo de l’Papo” (v. p. 8), pastro Lombardi aperas (surprizita kaj kontenta) apud Papo Francisko.

Kaj post malmultaj semajnoj la E-elsendo de RV festos tre rimarkindan atingon: preskaŭ 40 jaroj pasis de la nokto inter la 17-a kaj la 18-a de Aprilo 1976, kiam la programo nepa-

rade komenciĝis, per kelkaj bibliaj citaĵoj en la internacia lingvo legataj de pastro Giacinto Jacobitti kaj de la hungara sinjorino Erszebet Rémenyi Puracchio.

La estontecon de la RV-elsendo en Esperanto kaj en ĉiuj aliaj lingvoj decidis la reformo, kiu difinis la agadon de la nova Sekretariejo, por pli kaj pli unuecigi la ĝis nun



RADIO VATIKANA - ELSENDOJ EN ESPERANTO

La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama horo 21:20 MET (19:20 UTC).

DIMANĈE kun daŭro 8-minuta kaj **MERKREDE KAJ ĴAŬDE** kun daŭro 9-minuta.

Por aŭskulti ilin per la Interreto:

Rekte je la indikita horo: <http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/diretta.asp>

Laŭpete: http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp

Arkivo: <http://www.radio-vatikana-esperanto.org>

Skribu al: RADIO VATIKANA - ESPERANTO, SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO

Ret-poŝto: <esperanto@vatiradio.va>

Por ricevi retpoŝte la informilon de RV, petu abonon al: <promo@vatiradio.va>

LA SALETTE

La evento

La Salette estis kaj estas sensignifa vilaĝeto en la francaj Alpoj ie inter Grenoble kaj Gap. Troviĝas nur sovaĝa arbaro, modestaj kampoj kaj vastaj deklivaj herbejoj. La 19an de Septembro en la jaro 1846 tie du infanoj, Maximin Giraud, 11-jara, kaj Mélanie Calvat, 15-jara, dungitaj el la proksima pli granda vilaĝo Corps, helplaboris



paŝtante malgrandajn gregojn en la montaro. Ili ne estis parencoj kaj nur foje renkontiĝantaj, ili estis analfabetoj kaj vivis en familioj sen religia entuziasmo. En tiu tago ili hazarde kunvenis kun siaj bestoj en la sama herbejo, du horojn for de la vilaĝo, alte en la montoj.

Kiam ili post tagmeza ripozo denove okupiĝas pri la bestoj, ili rimarkas radiantan lumbulon kun homa silueto interne. Alirante ili ekvidas virinon sidantan sur ŝtono arde plorantan en afliktiĝa pozo. Ŝi leviĝas kaj invitas ilin proksimiĝi. Tuj ŝi komencas komuniki al ili mesaĝon, foje en rekta interparolado kun la geknaboj. Post kiam la infanoj ne bone komprenas ŝian norman francan lingvaĵon, ŝi senprobleme transiras al la regiona dialekto. Al ĉiu infano ŝi aparte konfidas sekreton, kiun la alia ne povas aŭdi. La virino ne identigas sin, sed parolas pri sia filo, kiun oni povas facile subkompreni kiel Jesuon. Ankaŭ la granda kruco pendanta de sur kateno ĉe ŝia ŝultro kun korpo vivsimile suferanta kaj sanganta, gvidas al tia konkludo. Reirante al la franca lingvo, ŝi anoncas la abundan fluadon de nova fontano tiuĉiloke kaj ordonas dufoje “Nu, miaj infanoj,

vi transdonos ĉion al mia tuta popolo.” Poste ŝi moviĝas ŝvebe al la lumbuleto, leviĝas iomete kaj malaperas en la ĉirkaŭanta lumo.

La mesaĝo

La mesaĝo koncernas la religian vivon de la regionanoj. Ĝi riproĉas la neglekton de la dimanĉo, la sakradon de la ĉaristoj, la ignoradon de la fasto-ordonoj. Kaze de rifuzo de submetiĝo, de pento, de pliboniĝo ĝi anoncas malmildan punon. La “Bela Damo”, kiel ŝin nomas la viziuloj, montras daŭre plorantan afliktiĝon, sed ŝiaj eksplikoj, ekzemploj kaj klarigoj estas rektaj, drastaj, aktualaj kaj bone kompreneblaj por ordinaraj homoj de la regiono.

Alie statas kun la sekretoj. En 1851 la infanoj devis noti ilin por la Papo. Dum la tempo tiuj versioj perdiĝis en la Vatikano. En 1879 Mélanie publikigis alian version, iom kontestatan de la ekleziaj aŭtoritatoj. Tie la alineoj traktas la konduton de pastroj, la sorton de papoj, politikajn eventojn, terurajn prognozojn, minacojn kaze de malkonvertiĝo, en tre konkretaj bildoj, kun tempaj indikoj kaj en klera lingvaĵo. Admirinde, ke infano povis parkerigi tekston tiom longan kaj tiom for de la propraj konoj.



La agnosko

Post la apero la infanoj descendis al la vilaĝeto kaj fervore raportis pri la evento. Maximin reiris tuj al sia hejmvilaĝo, Mélanie restis deĵorante en la montoj. Sekve de la diskonigo okazis tujaj konvertiĝoj en la popolo, sed ankaŭ leviĝis duboj. La politikaj kaj ekleziaj esploran-

toj ne povis trovi trukon, diferencojn, mensogojn en la eksplikoj de la mal-kunaj infanoj. Ene de la du unuaj jaroj 300.000 homoj vizitis la nur pene atingeblan lokon. En 1851 la episkopo de Grenoble proklamis post severaj pridemandadoj kaj esploroj, interkonsente kun la Sankta Seĝo, ke en la paŝtejo de La Salette aperis la Dipatrino Maria kaj ke oni tie konstruu pilgriman preĝejon kune kun la fondado de misiista ordeno, servonta al la pilgrimantoj. Ankaŭ postaj papoj montris simpatian, do, nova sanktejo estis kaj restis instalita, malgraŭ kontraŭreligiaj fazoj en la franca politiko.



Nuntempo

Estus facile, ironie trakti la kazon La Salette, kie du malkleraj infanoj asertis kontakton kun bela damo, kiun la eklezio identigis kiel la



Patrinon de Jesuo. Fakte okazas ofte ĉe mirakloj: ne nepre la afero mem estas la miraklo, sed ties efiko. Pri la malagrabla sorto de dubantoj ne estu dirate. Kiel kleran agnoskanton oni povas citi la francan literaturiston Paul Claudel, membron de la Franca Akademio. En sia libro "La revelacio de La Salette" (1946) li donas ekzegezon de la aŭtentaj tekstoj, de la konduto de la Damo kaj de ties vestoj plus akcesoraĵoj, adaptante ĉion al la situacio kaj kompreno de liaj samtempoj, al la tuta mondo de la dudeka jarcento. Li eĉ inkludas la tragikan akcidenton de kanada pilgrimgrupo, veninta el Romo kaj pereinta en aviadila kraŝo ĉe flanko de la apuda impona montego Obiou.

Hodiaŭaj pilgrimantoj trovas surprizan areon multe pli trunkvilan ol tiujn en Lourdes kaj Fatima. La tiamaj eventoj respuguliĝas en viv-

similaj statuoj de la infanoj kaj de la Damo. La fonto invitas al trinkado, la preĝejo al diservoj, la tuta loko al meditado. Migremuloj povas atingi la pinton de monto Gargas, alte super la sanktejo, en grandioza alpa naturo. Restado eblas en la alordigitaj hotelinstalaĵoj.

La loko La Salette, 1800 metrojn super la Mediteraneo, 15 kilometrojn for de la vigla ŝoseo, fine de valo, situanta senbrue en inspira montara pejzaĝo kun verdaj herbejoj, nokte sub senvuale brilantaj steloj, invitas al la renkontiĝo kun la propraj juĝoj kaj antaŭjuĝoj, ne nur rilate la aperon de la Dipatrino en la aktuala mondo.

Franz-Georg kaj Rita Rössler

(La artikolo estas dediĉita al la memoro de Jacques Tuinder; kiu mortis, kiam ni estis survoje al La Salette. Estis Jacques, kiu peris al ni ekspozicion en la monaĥejo de Egmond (NL), kiu efektiviĝis sub la titolo "Mi levas miajn okulojn al la montoj, de kie venas helpo por mi.")



La geviziuoj Maximin kaj Mélanie

Pro sia sufiĉe turmentita pasinteco la urbo Nitra en Slovakio estis tiel difinita. Ĝia oficiala interreta paĝaro ne havas dubojn deklarante: «Ne ekzistas multaj urboj dotitaj per tiom belaj ĉirkaŭaĵoj kaj tiom ideala lokiĝo kiel Nitra». Kaj oni finas la frazon aldonante: «Oni diras, ke Nitra, kiel Romo, estis fondita sur sep montetoj». Ĉu la komparo estas ambicia? En la klopodo trovi respondon, ni legu la historion kaj la priskribon de la monumentoj kaj lokoj de la urbo, en kiu okazos “Nia 69-a” IKUE-kongreso.

NITRA – LA PATRINO DE LA SLOVAKAJ URBOJ

Nitra, hungare Nyitra, germane Neutra, esperante ankaŭ Nitro, estas urbo en Slovakio, ĉefurbo de samnomaj regiono kaj distrikto. Ĝi troviĝas 90 km nordokcidente de Bratislavo. Ĝi havas areon de 108 km² kaj loĝantaron de ĉ. 90.000. Pro la situo ĉe monto Zobor la altodiferencoj en la urbo estas konsiderindaj; oni taksas ĝian mezan alton super maro jen 190 metrojn, jen 250.

La nomo de Nitra estas ligita kun la komenco de la historio de Slovakio, kun la nomoj de princoj Pribina (ĉ. 800-861) kaj Svatopluk (ĉ. 804-894), de la apostoloj de la Slavoj Ĉirilo kaj Metodo, kaj eĉ kun la mencio de la unua kristana preĝejo en Slovakio kaj kun la enkonduko de Glagolico, la pli antikva el la du ĉefaj alfabetoj slavonaj (la alia estas Kirilico).

La unuaj establiĝoj datiĝas de praepoko, kiel provas multnombraj arkeologiaj trovitaĵoj en la urba teritorio. Tiu areo estis dense loĝata regiono antaŭ ĉirkaŭ 30.000 jaroj. La unuaj kamparanaj ekloĝadoj estas dateblaj antaŭ ĉirkaŭ 6.000 jaroj.



La kastelo kun la katedralo en Nitra

En la 4-a jarcento a.K. la slovak teritorio estis loĝata de la keltoj, kiuj restis tie dum longa periodo. Ili estis kapablaj fandistoj kaj forĝistoj, kies kabanaj kaj laborejoj estis trovitaj ĉe la piedo de Martinský vrch (Monteto de Marteno). Ankaŭ la Dakoj postlasis siajn spurojn.

La slava historio de Nitra komenciĝis ĉirkaŭ la fino de la 5-a jarcento, kiam la unuaj slavoj

alvenis. Jam en la unua duono de la 7-a jarcento iuj okcidentaj fontoj mencias la formadon de slava ŝtato, t.e. la Imperio (de reĝo) Samo, kreita per la ligo de slavaj triboj kaj kiu ekzistis de la jaro 631 ĝis la jaro 658, jaro de la morto de la reĝo. Ĝia centro

estis tre probable en Moravio kaj la unuigo inkluzivis Silezion, Luzacion (teritorio en orienta Germanio, kies malgranda parto hodiaŭ troviĝas en Pollando) kaj la antikvan regionon de Karantanio (pli malpli: Supra Karin-tio, orienta Tirolo, Stirio kaj slovena Karintio). Imperio de Samo estis la antaŭaĵo de la Grandmoravia Imperio, unu el kies centroj estis Nitra. Ĝuste dum la epoko de la Grandmoravia Imperio estis metitaj la bazoj por la refamiĝo de la antikva kristana Nitra, kiel estas notita en tre valoraj dokumentoj de la 9-a jarcento.

Unu el la fortikigitaj setlejoj eble estis la restadejo de princo Pribina, sub kies regado Nitra fariĝis grava politika, milita kaj ekonomia centro. Pribina estis saĝa ŝtatestro kaj li elmontris grandan intuicion pri la eŭropa politiko, kiam post ĉirkaŭ la jaro 828, li, kvankam pagano, permesis la konsekron de la unua kristana preĝejo en Nitra. La konsekron celebris Adalram, ĉefepiskopo de Salzburgo. Tiu preĝejo estas la unua historie dokumentita atesto pri la kristaneco de la slavoj en la teritorio de Slovakio. Ĉi tiuj grandaj eventoj estas menciitaj en dokumento “*Conversione Bagoariorum et Carantanorum*” (konvertiĝo de la bavaroj kaj de la karantanianoj) datita en la jaroj 870-871. Bedaŭrinde hodiaŭ oni ne scias, kie precize lokiĝis tiu unua preĝejo, sed oni opinias, ke ĉiukaze ĝi ne staris sur la hodiaŭa monteto de la Kastelo. *Daŭrigota en EK 4-6/2016*



La urba emblemo

Ni funebras kaj kondolencas

Prof-ro ARMANDO ZECCHIN

(Cartura, Padova, 4/12/1924 – Torino, 5/1/2016)



Pro mjelomo forpasis 91-jaraĝa nia itala IKUE-ano, studulo de la malnovgreka kaj latina lingvoj kies licea profesoro li estis. Liaj ampleksaj teologiaj kaj filozofiaj konoj respeguliĝis en liaj verkoj, per kiuj li kunlaboris kun diversaj revuoj ankaŭ esperantistaj. Li eklernis Esperanton jam sufiĉe aĝa (en 1990), kiun li taksis nova vojo por kultura komunikado. Abunda estis lia tradukado el kaj al Esperanto, sed ne mankis propra 400-paĝa originala romano: “La homo, kiu ne sukcesis trompi sin mem”. Li pliampleksigis la italan-esperantan Kompendion de religiaj terminoj, iniciatitan antaŭ jaroj de pastro Giacinto Jacobitti. Laste li multe agadis por la redakto de artikoloj en la esperantlingva Vikipedio pri religiaj kaj filozofiaj temoj. La funebra rito okazis la 8-an de Januaro en la torina preĝejo de sankta Benedikto Abato, kun pluraj kuncelebrantaj pastroj kaj je la ĉeesto de esperantistoj, kiuj alportis la flagon: indikante ĝin unu el la celebrantoj memorigis, ke Esperanto estis unu el la pasioj de la forpasinto.

S-ino JANINA RAILIENĖ

(Litovio, 6/10/1937 – Panevėžys, 3/2/2016)



La 3-an de Februaro 2016 subite haltis la koro de la aktiva katolikino kaj esperantistino Janina Railienė. Ŝi ĉiam estis plena de energio, vivĝojo, bonhumuro kaj bonkoremo, preta helpi al ĉiu homo. Ŝi multe zorgis pri E-agado ne nur en sia urbo, sed ankaŭ en la tuta Litovio. Tre komunikema virino, ŝi rapide trovadis komunan lingvon kun ĉiuj homoj, inter ili ankaŭ kun pastroj. Unu el ili estis la saleziana pastro Pranas Gavenas, kiu antaŭ 17 jaroj instigis ŝin disvastigi revuon “Salezianaj novaĵoj”. Pri tio ŝi senpage okupiĝis ĝis la lastaj tagoj de sia vivo. Ŝi emis legi la revuojn Espero Katolika kaj Dio Benu kaj al aliaj geesperantistoj ŝi rekomendadis ilin aboni. Kiel volontulino ŝi servis en Malta Ordeno. Janina partoprenis kelkajn IKUE-kongresojn. Dum la funebra sankta meso de la 6-a de Februaro en Panevėžys ĉeestis kaj preĝis ŝiaj parencoj, geamikoj, gekolegoj (medicinistoj), konatuloj kaj granda aro da geesperantistoj en plena preĝejo.

Pastro GIOVANNI MARIA GATTI

(Milano, 3/11/1931 – Erba, Milano, 15/2/2016)



Ordinita pastro la 27/6/1954 en la Katedralo de Milano, Italio, post unujara instruista laboro en Instituto de urbo Saronno, li estis de 1955 ĝis 1984 paroĥa vikario en vilaĝo Montesiro. Poste li fariĝis paroĥestro de paroĥo sankta Maria Ĉielenprenita en Casiglio di Erba, kiun li gvidis de 1984 ĝis 2008. Post la fino de sia tasko, li restis en Erba kaj ĝisfine, kvankam la korpa forto ekmalaperis pro malsaniĝo, li partoprenis en la eŭkaristaj celebroy de tiu komunumo. De 2008 datiĝas lia unua kontakto kun la itala sekcio de IKUE al kiu li tuj aliĝis. Lerninte Esperanton li pledis por la uzo de “ci” kaj por la enkonduko de la verba imperfekto. La revuo de la itala IKUE-sekcio publikigis liajn artikolojn, inter kiuj estis “distanca debato” kun prof-ro Zecchin pri la evangelia rakonto de la nupto en Kano de Galileo.

Geedzoj **Petr Dohnálek kaj Lucie Dohnálková** (Ĉeĥio) sciigis: “Kun ĝojo ni anoncas, ke vendrede la 29-an de Januaro 2016 frumatene naskiĝis al ni filo Francisko”. Multe da diaj benoj al niaj karaj gesamideanoj kaj kisetojn al la eta Francisko!



JUBILEOJ. La 25-an de Decembro 2015 geedzoj **Lucia Zaniol kaj Serio Boschin** festis la 60-jariĝon de sia geedziĝo. Al Serio, dumviva membro de IKUE, kiu cetera la 3-an de Februaro fariĝis 85-jaraĝa, kaj al lia edzino Lucia gratulojn kaj rememoron en la preĝoj. Nia iama Prezidanto **Miloslav Šváček** atingis sian 75-an vivojaron la 2-an de Februaro: multe da diaj benoj al nia kara Miloš. Samajn diajn benojn ni deziras al Pastro **Patro Carlo Cecchitelli** (civilstate: Antonio) eminenta franciskano, iama Gardanto de Sankta Lando (kun rango de Episkopo), esperantisto, kiu la 24-an de Februaro plenumis 80 jarojn.

KONGRESOJ kaj RENKONTIĜOJ

La 30-a kongreso de la itala IKUE-sekcio UECI okazos de la 3-a ĝis la 7-a de Junio en Asizo (Italio), kun la temo prenita el la vortoj de sankta Francisko: “Mi volas sendi vin ĉiujn al Paradizo”. Antaŭ 800 jaroj, en 1216, la Malriĉuleto eldiris ĉi tiujn vortojn, anoncanta al la popolo ariĝinta ĉe Porziuncola la indulgencon de la sankta Pardonado de Asizo. Pli ol kongreso, ĝi estos pilgrimo al la franciskanaj lokoj sub la lumo de la Jubileo de la Mizerikordo. Oni vizitos ne nur Asizon kaj ĝiajn bazilikojn, pilgrimlokojn kaj monumentojn, sed oni eliros por eniri en la franciskan etoson de Greccio, por admiri, per la naturaj akvofaloj de Marmore kaj per la beleco de urbo Perugia, la agadon de la Kreanto. La kongresejo estos monaĥejo apud la baziliko de Sankta Maria de la Anĝeloj. Aliĝkoto: 20 eŭrojn (ĝis fino de Aprilo, poste: 40 eŭrojn). Loĝado, manĝoj kaj ekskursoj: 220 eŭrojn en unulita ĉambro; 200 eŭrojn en dulita ĉambro. Oni povas deŝuti la aliĝilon ĉi tie: <http://www.ueci.it/aligxiloj>



La Ĉeĥa IKUE-Sekcio kore invitas al partopreno de la septembra renkontiĝo okazonta en belega medio de la ĉarma Maria-pilgrimloko Vranov apud urbo Brno (Moravio) situanta en pitoreska natura regiono. La renkontiĝo okazos de la 16-a ĝis la 18-a de Septembro en la Spirita Centro de Sankta Francisko el Paola. Vranov estas facile atingebla ne nur aŭtomobile, sed ankaŭ per urba buslinio el Brno aŭ per buslinioj el fervojaj stacioj Kuřim kaj Česká. La informojn kaj aliĝilon oni povas deŝuti el ttt-paĝoj de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio: <http://www.ikue.org/cz/vranov/vranov.htm>



La Estraro de IKUE memorigas al la legantoj, ke plu ekzistas ebleco aliĝi al la **69-a Kongreso de IKUE** okazonta en la urbo Nitra, Slovakio, en la tagoj 16.-23.07.2016. La informojn kaj la aliĝilon oni povas deŝuti ĉi tie: <http://www.ikue.org/kong2016/aligilo2016ikue.pdf>, aŭ ĉi tie en formato pdf kaj doc: <http://www.ikue.org/cz>.

Ne forgesu ĝis la 16-a de Aprilo proponi vin aŭ al vi konatan IKUE-an(in)on por la okazonta **baloto de la Estraro kaj Prezidanto de IKUE**. La proponojn sendu al retadreso: ikue@ikue.